

Wilhelm Müller,

Ĉe put' antaŭ pordego

tradukita de Joachim Gießner

Ĉe put' antaŭ pordego
 jen staras la tili'.
 En ĝia ombro dolĉe
 ja ofte revis mi.
 Mi tranĉis karajn vortojn
 en ĝia kruda ŝel'.
 En ĝojo kaj doloro
 ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri
 dum nokta obskurec'.
 Mi fermis la okulojn
 en nigra malhelec'.
 Kaj kvazaŭ min vokante
 la branĉoj muĝas jen:
 "Ĉi tien vi nur venu
 kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovis
 dolore kontraŭ mi.
 De l' kap' ĉapel' forflugis,
 ne turnis mi al ĝi.
 Nun malproksima estas
 mi for de la tili',
 sed vokas ĝi: "Nur venu,
 trankvilon trovos vi!"

...

Wilhelm Müller,

Ĉe puto antaŭ l'urbo

tradukita de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj)

Ĉe puto antaŭ l' urbo
 jen staras la tili',
 en kies ombro dolĉe
 revadis ofte mi.
 Mi tranĉis en la ŝelon
 amsignojn pro memor';
 sopir' min tien logis
 en ĝojo kaj dolor'.

En lasta nokto pasis
 mi preter la tili',
 sed malgraŭ la malhelo
 okulojn fermis mi.
 Jen ĝiaj branĉoj muĝis
 kaj ŝajnis logi min:
 "Restadu, ho migrulo,
 ni trankviligos vin!"

La vento kontraŭblovis,
 ĉapelon ŝiris for.
 Sed pelis min antaŭen
 turmentoj de la kor'.
 Se plue mi vagadus
 eĉ ĝis la monda fin',
 la branĉoj ĉiam logus:
 "Ni trankviligos vin!"

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25) en 2001-11.*

Arg-83-165 (2003-12-28 22:58:15)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Mia kantaro I”, kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj).*

Arg-83-164 (2003-11-09 21:14:39)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la germana Esperanto-lernolibro “Post la kurso” de WILHELM kaj HANS WINGEN, sur paĝo 68. Sube estas indikite tie: “Laŭ L. E. Meier k. a.”. El tio oni povas konkludi, ke ĝi ne estas la origina tradukversio de L. E. MEIER kaj ke ĝi estas iom ŝanĝita de aliuloj, eble de la fratoj WINGEN mem.